

Nova alvoko al monda karavano kontra? la usona blokado trudata al Kubo



Sukcesa agotago kontra? la usona blokado dum tiu ?i semajnofino

Havano, apr 26 (RHK) La alvoko jam estas lan?ita por la 30-a de majo por nova monda karavano kontra? la usona sie?o trudata al Kubo kun la sperto de la agotagoj travivitaj dum tiu ?i semajnofino.

?i-sabate kaj diman?e, la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel skribis en Tvitero: “la monda protesto kontra? la sie?o transformi?is en nehaltigeblan ondon”; “hodia? estas miloj, morga? estos milionoj kaj iutage estos la tuta homaro. Ne ekzistas krimo da?ranta cent jarojn, nek popolo suverena, kiu akceptu submeti?on”.

Nur en Usono pli ol 20 urboj havis marŝojn de aŝtoj portantaj flagoj kubaj, dum cirkuladis videoj de la partoprenantoj en Miamio, Alabamo, Vaŝingtono, Tampa, Indiana, Tenesio, Illinois, Miŝigano, Georgia, Kalifornio, Connecticut kaj Wisconsin.

En ĉinio, Kanado, Belgio, Portugalio, Svedio, Irlando, Hispanio, Britio, Italio, Danlando, Rusio kaj pli ol 15 urboj de Germanio, la manifestaciintoj levis siajn voŝojn por denunci la blokadon.

Same en Irano, Seychelles, Gvineo Bisao, Zambio, Tanzanio, Angolo, Etiopio, Dominika Respubliko, Panamo, Argentino, Brazilo, Urugvajo kaj Kolombio oni kondamnis la agresemon de la Blanka Domo, dum Meksiko gastigis la XXV-an naciajn Renkontiĝon de Solidarideco al Kubo.

En Kubo ankaŭ okazis agotagoj subtene al la monda solidareco per karavanoj en la provincoj Las Tunas, Guantánamo kaj Villa Clara kaj en la speciala municipo Insulo de Junularo, boat-parado fronte al la havana moleo kaj tutlande okazis tvit-agado kontraŭ la puniga regularo.

Solidaraj movadojkiel la projekto Amopontoj, la kanalo Eŭropo por Kubo, Unblock Cuba kaj aliaj kampanjoj konfirmis ke ne finiĝos la agotagoj ĉiŝes la usona agresemo.

Oni preparas aliajn agojn por junio, kiam Kubo prezentu antaŭ la Ĝenerala Asembleo de UN la projekton de rezolucio kontraŭ la sieĝo de Vaŝingtono.

fonto: PL

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/255292-nova- Alvoko-al-monda-karavano-kontrau-la-usona-blokado-trudata-al-kubo>



Radio Habana Cuba